


174







Tutmonda Biblioteko je la memoro
de L. Tolstoj.

№ 4.

PER KIO HOMOJ ESTAS VIVAJ.

RAKONTO DE

L. Tolstoj.

Tradukis el rusa lingvo
N. Kabanov.



ELDONO DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

№ 1032.

Moskvo, 1912.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

Esper. 115 I



Типо-литогр. Т-ва И. Н. КУШНЕРЕВЪ и К^о. Пименовская ул., соб. д
МОСКВА — 1912.

I.

Botisto kun edzino kaj kun infanoj loĝis ĉe unu vilaĝano. Li havis nek sian domon, nek sian plugteron, kaj li nutris sin kaj sian familion per botista laboro. Pano estis kara, laboro estis malkara, kaj kion li enspezas per laboro, tion li elspezas por nutrado. La botisto kun sia edzino havis solan pelton, kaj ĝi eluziĝis ĝis ĉifonoj; dum du jaroj li estis intencanta aĉeti ŝafofelon por nova pelto.

Aŭtune la botisto jam havis necesan monon: lia edzino gardis en kesto trirublan monbileton, kaj vilaĝanoj estis ŝuldantaj al li kvin rublojn dudek kopekojn.

Unu matenon la botisto decidis ekiri vilaĝon por pelto. Li vestis sur ĉemizon virinan nankenon mallongan vat-pelton kaj supre—drapan kaftanon; li metis en poŝon trirublan monbileton, prenis bastonon kaj ekiris post matenmanĝo. Li pensis: „mi ricevos de vilaĝanoj kvin rublojn, aldonos miajn tri rublojn kaj aĉetos ŝafofelon por pelto“.

La botisto venis vilaĝon, vizitis unu vilaĝanon—li ne estas hejme; lia virino promesis alsendi la edzon kun mono tiun-ĉi semajnon, sed monon mem ŝi ne donis. Li vizitis alian vilaĝanon—la vilaĝano ekjuris, ke li ne havas monon, nur pagis dudek kopekojn por riparo de

botoj. La botisto esperis preni ŝafofelojn kredite. Sed ŝafofelisto ne donis kredite.

— Alportu monon, li diras, tiam elektu ŝafofelojn, kiajn vi volas; ja mi scias, kiel estas malfacile ricevi ŝuldojn.

Tiel la botisto faris nenian aferon: nur li ricevis dudek kopekojn por riparo kaj prenis ĉe vilaĝano malnovajn feltbotojn por kovri ilin per ledon.

La botisto bedaŭris, drinkis brandon por ĉiuj dudek kopekoj kaj ekiris hejmen sen pelto. Matene ŝajnis al la botisto, ke frostas, sed kiam li drinkis, estis varme al li eĉ sen pelto. La botisto iras laŭ vojo, per unu mano li frapetas je vojaj ŝtonoj per la bastono, per alia mano li svingetas feltajn botojn kaj interparolas kun si mem.

— Al mi estas varme, — li diras, — eĉ sen pelto. Mi drinkis, kaj brandeto ludas en ĉiuj vejnoj. Kaj mi ne bezonas pelton. Mi iras, forgesinte malĝojon. Jen kia homo mi estas. Mi travivos ankaŭ sen pelto. Neniam ĝi estos necesa por mi. Nur jen kion domaĝas, — la virino ekenuos. Jen kio estas ofenda: mi laboras por li, kaj li trompas min. Nu atendu nun: se vi ne alportos monon, mi prenos de vi ĉapon, je Dio, prenos! He, li pagas ŝuldon po dudek kopekoj! Nu, kion fari kun dudek kopekoj? Nur — drinki. Li diras: „mi estas en mizero“. Vi estas en mizero, sed mi — ĉu mi ne estas? Vi havas domon, brutojn, ĉion, kaj mi — kion mi havas? vi havas vian propran panon, sed mi havas aĉetitan panon: por sola pano mi devas enspezi tri rublojn ĉiu-

semajne — de kie ajn. Mi venos hejmen, kaj pano jam finiĝis. Denove mi elmetu unu rublon kaj duonon. He, vi redonu mian al mi!

Tiele la botisto aliras al kapelo, apud flankeniĝo de la vojo; li rigardas, io blankas post la kapelo mem. Jam vesperiĝas; la botisto enrigardas, sed ne povas kompreni, kio ĝi estas. „Ŝtono, li meditas, ne estis tia ĉi tie. Brute? ne estas simile al bruto. Laŭ kapo estas simile al homo, sed ĝi estas blanka. Kaj pro kio estos homo ĉi tie?“

Li aliris pli proksime—iĝis tute videble. He, kia mirindaĵo: kvazaŭ homo, viva aŭ malviva, sidas tute nuda, sin apogis al la kapelo kaj ne movetiĝas. La botisto ektimis kaj pensas: oni mortigis iun homon, senvestigis kaj ĵetis ĉi tie. Se mi nur aliros, mi enretiĝos en tian aferon...“

Kaj la botisto ekpasis pretere. Kiam li preterpasis la kapelon, ekrigardis reen, vidas: la homo apartiĝis de la kapelo, movetiĝas, kvazaŭ enrigardas. Ankoraŭ pli ektimis la botisto; li pensas: ĉu aliri, ĉu preterpasi? Aliri—povas esti malbone; kiu scias, kia li estas? Ne pro bonaj aferoj li montriĝis ĉi tie. Se me aliros, li alsaltos kaj sufokos, kaj mi ne foriĝos de li; kaj se li ne sufokos, jen—tiam mi klopodu kun li. Kion fari al li, nuda? Ja mi ne povas demeti veston de mi mem, fordoni lastan. Dio evitigu nur!“

Kaj la botisto plirapidigis paŝojn; li jam tute preterpasis la kapelon, sed la konscienco ekriproĉis lin.

Kaj la botisto haltis sur la vojo.

— He, Simeono,—li diras pri si mem,—kion vi faras? La homo mortas en mizerio, kaj vi ektimis, pasas pretere. Ĉu vi fariĝis riĉa? Ĉu vi timas, ke oni forrabos viajn riĉaĵojn? He, Simeono, ĝi estas nebona!

II.

Simeono returnis sin kaj ekiris al la homo; Simeono aliras al la homo, rigardas lin kaj vidas: la homo juna, forta; batsignoj ne estas vidataj sur la korpo; nur vidate estas, ke la homo frostiĝis kaj timiĝis,—sidas, sin apoginte, kaj ne rigardas Simeonon, kvazaŭ li malfortiĝis, ne povas malfermi okulojn. Simeono aliris tute proksime, kaj subite — la homo kvazaŭ rekonsciiĝis; turnis la kapon, malfermis la okulojn kaj ekrigardis Simeonon. Kaj pro tiu ĉi ekrigardo Simeono ekamis la homon. Li jetis teren feltajn botojn, senzoniĝis, metis zonon sur la botojn, demetis la kaftanon.

— Nu jen, li diras,—surmetu! Nu!

Simeono prenis la homon sub kubuto, komencis levi. La homo sin levis. Kaj Simeono vidas — la korpo estas subtila, pura, la manoj kaj la piedoj estas ne vunditaj, la vizaĝo estas kortuŝanta. Simeono surjetis al li la kaftanon sur la ŝultrojn. Li ne povas trafi manikojn. Simeono direktis liajn manojn en manikojn, surŝovis, kuntiris la kaftanon kaj zonis lin.

Simeono volis ankaŭ demeti de sia kapo la disŝiritan ĉapon, surmeti ĝin sur la kapon de la homo, sed iĝis malvarme al lia kapo; li pensas: „mi havas senharaĵon je

tuta kapo, kaj li havas harojn krispajn, longajn“; li denove surmetis la ĉapon. „Estos pli bone, se mi surmetos botojn al li“.

Li sidigis lin kaj vestis la piedojn per la feltaj botoj. La botisto vestis lin kaj diras:

— Jen, frato. Nu, movetu vin, varmiĝu. Kaj oni prikonsideros ĉiujn tiujn ĉi aferojn sen ni. Ĉu vi povas iri?

La homo staras, rigardas afable Simeonon kaj povas nenion elparoli.

— Pro kio vi parolas nenion? Ja ni ne pasigos vintron ĉi tie. Necesas iri loĝejon. Nu, jen, prenu mian bastonon, apogu vin, se vi malfortiĝis. Ekmovetiĝu.

Kaj la homo ekpaŝis. Li ekpaŝis facile, ne postrestas. Ili iras voje kaj Simeono diras:

— De kie vi estas?

— Mi ne estas de tie-ĉi.

— Mi konas ĉi-tieajn. Sed kia okazo alkondukis vin ĉi-tien, al la kapelo.

— Mi ne povas diri.

— Versajne, homoj ofendis?

— Neniu min ofendis. Dio punis min.

— Certe, ĉio estas de Dio; tamen necesas ien aliĝi. Kien vi intencas iri?

— Por mi estas tute egale.

Simeono miris. Li ne similas arogantulon, estas afabla en parolado, sed nenion parolas pri si. Kaj Simeono pensas: „ja diversaj aferoj okazas“. Kaj li diris al la homo:

— Nu, iru hejmen al mi, almenaŭ vi varmiĝos tie.

Simeono iras, la migranto ne postrestas lin, iras kune. Ekventis, blovas al Simeono sub ĉemizon, kaj riĝo komencis malaperi, kaj li komencis malvarmiĝi. Li iras, ronkas per nazo, kuntiras virinan pelteton kaj pensas: „nu jen pelto; mi ekiris por pelto kaj revenos hejmen sen kaftano kaj eĉ alkondukos nudulon. Matrjono ne laŭdos min!“ Kaj kiam Simeono pensas pri Matrjono, li ekenuas. Kaj kiam li rigardas la migranton, rememoras, kiel la migranto ekrigardis lin post la kapelo, la koro ekgajas en li.

III.

La edzino de Simeono ordigis hejmon frue. Ŝi hakis hejtlignojn, alportis akvon, nutris infanojn, manĝis mem kaj komencis mediti, kiam prepari paston por baki panon: hodiaŭ aŭ morgaŭ? Restiĝ granda peco da pano.

„Se Simeono, ŝi pensas, tagmanĝos tie, li manĝos vespere nemulte, kaj pano restos por morgaŭ“.

Matrjono turnis, turnis panpecon en manoj, pensas: „Hodiaŭ mi ne preparos paston. Faruno restis nur por unu bakado“.

Matrjono kasis panon kaj sidiĝis apud tablo surkudri flikajon sur edzan ĉemizon. Ŝi kudras kaj pensas pri la edzo, kiel li aĉetos ŝafofelojn por pelto.

„Ŝafofelisto ja povas trompi lin. Mia edzo estas tre simpla. Li mem trompos nenium, sed eĉ malgranda infano povas trompi lin. Ok rubloj estas nemalgranda mono. Eble estas fari bonan pelton. Kvankam ne tanita, tamen—pelto. Pasintan vintron kiel malfacile estis por ni sen

pelto! Nek ekiri al rivero, nek ien! Jen li ekiras, vestas ĉion sur sin, kaj nenio restas ĉe mi por vesti. Li ekiris ne antaŭnelonge; jam estas tempo por reveni. Eble, li ekdrinkis, mia falketo“.

Ĵus kiam Matrjono pensis, ŝtupoj de perono ekknaris, iu eniris. Matrjono ĉesis kudri, eliris vestiblon. Ŝi vidas—du eniris: Simeono kaj ia vilaĝano kun li, sen ĉapo, en feltaj botoj.

Matrjono tuj eksentis de la edzo odoron de brando. „Nu, ŝi pensas, efektive li drinkis“. Kaj kiam ŝi ekvidis, ke li estas sen la kaftano, en sola mallonga pelteto kaj portas nenion kaj silentas, konfuziĝas,—falas la koro ĉe Matrjono. Li fordrinkis, ŝi pensas, monon, diboĉis kun iu malbonulo kaj ankoraŭ alkondukis lin kun si.

Matrjono enirigis ilin domon, eniris mem: ŝi vidas—homo estas fremda, juna, malgrasa, kaftano sur li estas ilia. Ĉemizoj estas nevidata sub la kaftano, ĉapo malestas. Kiam li eniris, li haltis, ne movetiĝas kaj ne levas okulojn. Kaj Matrjono pensas: li estas ne bona homo: li timas.

Matrjono sulkis frunton, deiris al forno, rigardas, kion ili faros.

Simeono demetis la ĉapon, sidiĝis sur benkon.

— Nu, Matrjono,—li diras,—preparu vespermanĝon!

Matrjono murmuris ion. Kiel ŝi stariĝis apud la forno—ne movetiĝas: ŝi rigardas jen unu jen alian, nur balanacas la kapon. Simeono vidas, ke la virino estas malkontenta, sed—kion fari: li kvazaŭ ne rimarkas, prenas la migranton je mano.

— Sidiĝu, frato,—li diras,—ni vespermanĝu.

La migranto sidiĝis sur la benkon.

— Nu, ĉu vi ne kuiris?

Matrjono ekkoleris.

— Mi kuiris, sed ne por vi. Mi vidas, ke vi fordrinkis eĉ saĝon. Vi ekiris por pelto kaj revenis sen kaftano kaj ankoraŭ alkondukis kun vi iun nudan vagulon. Ne, mi ne havas vespermanĝon por vi, drinkuloj.

— Ĉesu, Matrjono, por kio vi babilas senbezone. Vi demandu antaŭe: kia homo...

— Vi diru, kien vi elspezis monon?

Simeono elmetis monbileton el poŝo, malfaldis ĝin.

— Jen mone; sed Trofimov ne pagis, promesis pagi morgaŭ.

Matrjono ekkoleris ankoraŭ pli: li ne aĉetis pelton kaj surmetis la lastan kaftanon sur iun nudulon kaj alkondukis lin al si.

Ŝi ekkaptis monbileton de la tablo, ekportis ĝin par kaŝi, mem diras:

— Mi ne havas vespermanĝon. Mi ne povas nutri ĉiujn nudajn drinkulojn.

— He, Matrjono, detenu la langon. Antaŭe aŭskultu, kion mi diros.

— Nu; kion aŭskulti de ebria malsaĝulo! Ne vane mi ne volis edziniĝi je vi, drinkulo; panjo dotis al mi tolon, kaj vi fordrinkis ĝin; vi ekiris aĉeti pelton—ankaŭ fordrinkis.

Simeono volas klarigi al la edzino, ke li fordrinkis nur dudek kopekojn, volas diri, kie li trovis la homon;

Matrjono ne lasas al li diri eĉ unu vorton; de kie kio preniĝas: ŝi parolas po du vortoj per unu fojo. Kio okazis antaŭ dek jaroj, ankaŭ tion ŝi rememorigis.

Matrjono parolis, parolis, alsaltis al Simeono, ekkaptis lin je maniko.

— Redonu mian pelteton; ĝi sola restis, kaj vi forprenis ĝin de mi kaj surmetis sur vin. Redonu al mi, kotmakulita hundo, apopleksio vin disbatu.

Simeono komencis demeti de si pelteton, elturnis manikon; la virino ektiris, la pelteto ekrakis en kunkudroj, Matrjono ekkaptis la pelteton, surĵetis sur la kapon kaj aliris al la pordo. Ŝi volis foriri, sed haltis: jen ŝi ekkoleris — volas elversi koleron, jen ŝi deziras ekscii, kiu estas tiu homo.

IV.

Matrjono haltis kaj diras:

— Se li estus bona homo, li ne estus nuda; sed sur li eĉ ĉemizo malestas; se li irus por bonaj aferoj, vi dirus, de kie vi alkondukis tian elegantulon.

— Nu ja mi diras al vi: mi iras, li sidas nuda apud la kapelo, tute malvarmiĝis. Ja ne somero estas nun, por iradi nuda. Dio renkontigis min kun li, alie li pereus. Nu, kion fari? Ja diversaj aferoj okazas! Mi vestis lin kaj alkondukis ĉi tien. Kvietigu vian koron. Estas peko, Matrjono. Ja ni ankaŭ mortos.

Matrjono volis insulti, sed ekrigardis la migranton kaj eksilentis. La migranto sidas, ne movetiĝas, de kiam li sidiĝis sur rando de la benko. La manoj estas kunme-

titaj sur la genuoj, la kapo estas mallevita sur la bruston; li ne malfermas okulojn kaj ĉiam sulkigas la vizaĝon, kvazaŭ io sufokas lin. Matrjono eksilentis. Simeono diras:

— Matrjono, ĉu vi ne havas Dion?

Matrjono ekaŭdis tiun ĉi vorton, ekrigardis ankoraŭ unu fojon la migranton, kaj subite ŝia koro mildiĝis. Ŝi deiris de la porto, aliris al la forna angulo kaj elmetis vespermanĝon. Ŝi metis sur la tablon supujon, versis kvason, elmetis lastan panpecon. Ŝi donis tranĉilon kaj kulerojn.

— Nu, manĝu, — ŝi diras.

Simeono almovis la migranton al la tablo.

— Sidiĝu, bravulo, — li diras.

Simeono tranĉis panon, dispecigis ĝin, kaj ili komencis vespermanĝi. Kaj Matrjono sidiĝis apud angulo de la tablo, sin apogis per la mano kaj rigardas la migranton.

Kaj Matrjono ekkompatis la migranton kaj ekamis lin. Kaj la migranto subite ekgajis, ĉesis sulkigi la vizaĝon, levis okulojn sur Matrjonon kaj ekridetis.

Ili finis vespermanĝi; la virino ordigis kaj komencis demandi la migranton.

— De kie vi estas?

— Mi ne estas ĉi tiea.

— Sed kia okazo alkondukis vin sur vojon?

— Mi ne povas diri.

— Kiu forrabis vin?

— Dio punis min.

— Ĉu tiel nuda vi kuŝis?

— Tiel nuda mi kuŝis, frostiĝis. Simeono ekvidis min, ekkompatis, demetis de si la kaftanon, vestis min kaj ordonis veni ĉi tien. Kaj tie-ĉi vi nutris min, trinkigis, kompatis. Dio savu vin!

Matrjono sin levis, prenis de fenestro malnovan simeonan ĉemizon, tiun saman, kiun ŝi flikis, donis al la migranto, trovis ankoraŭ pantalonojn, donis.

— Prenu, jen; mi vidas, vi ne havas eĉ ĉemizon. Vestu vin kaj kuŝiĝu, kie vi deziras: aŭ sur bretlito, aŭ sur forno.

La migranto demetis la kaftanon, surmetis la ĉemizon kaj la pantalonojn kaj kuŝiĝis sur la bretlito. Matrjono estingis lumon, prenis la kaftanon kaj kuŝiĝis apud la edzo.

Matrjono sin kovris per rando de la kaftano, kuŝas kaj ne dormas,—ĉiam ŝi pensas pri la migranto. Kiam ŝi rememoras, ke li manĝis lastan panpecon, ke morgaŭ ŝi ne havos panon, kiam ŝi rememoras, ke ŝi fordonis ĉemizon kaj pantalonojn, tiam ŝi ekenuas; sed kiam ŝi rememoras, kiel li ekridetis, tiam ekgajas ŝia koro.

Longe Matrjono ne dormis, kaj ŝi aŭdas — Simeono ankaŭ ne dormas, surtiras sur sin la kaftanon.

— Simeono!

— He!

— Ni manĝis lastan panon, kaj mi ne preparis paston por nova pano. Mi ne scias, kiel ni estos morgaŭ. Eble, mi petos ĉe bapтанino Malanjo.

— Se ni estos vivaj, ni estos sataj.

La virino kuŝis iom, silentis iom.

— Ŝajnas, li estas bona homo; nur pro kio li ne rakontas pri si?

— Versajne, estas neeble.

— Simĉjo?

— He!

— Ni donas, sed pro kio al ni neniu donas?

Simeono ne scis, kion diri. „Ĉesu“, li diras. Li turnis sin kaj ekdormis.

V.

Matene Simeono maldormiĝis. La infanoj dormas, la edzino ekiris al najbaroj pruntepreni panon. La hieraŭa migranto, en malnovaj pantalonoj kaj en ĉemizo, sola sidas sur la benko kaj rigardas supren. Kaj lia vizaĝo estas pli serena, ol hieraŭ.

Kaj Simeono diras:

— Nu, karulo: ventro petas panon, nuda korpo — veston. Necesas enspezi por nutriĝo. Ĉu vi scias labori?

— Mi scias nenion.

Simeono miris kaj diras:

— Nur se estus deziro. Por ĉia laboro homoj instruigas.

— Se homoj laboras, mi ankaŭ laboros.

— Kia estas via nomo?

— Mikaelo.

— Nu, Mikaelo, se vi ne volas rakonti pri vi, ĝi estas via afero, sed necesas enspezi por nutriĝi. Se vi laboros, kion mi ordonos, mi nutros vin.

— Dio savu vin, mi instruigos. Montru, kion fari.

Simeono prenis ne torditan fadenon, surmetis sur fingrojn kaj komencis fari fadenan finon.

— La afero estas nemalfacila, rigardu...

Mikaelo rigardis, ankaŭ surmetis fadenon sur fingrojn, tuj imitis, faris finon.

Simeono montris al li, kiel necesas peĉi fadenojn. Ankaŭ komprenis Mikaelo per unu fojo. La mastro montris, kiel entordi haregojn, kiel stebi; Mikaelo ankaŭ komprenis per unu fojo.

Kian ajn laboron Simeono montras al li, li ĉiam komprenas per unu fojo; kaj de tria tago li komencis labori, kvazaŭ li kudris botojn tutan sian vivon. Li laboras seninterrompe, manĝas malmulte; se laboro interrompas,—li silentas kaj ĉiam rigardas supren. Li ne iradas sur la straton, parolas nenion superfluan, ne ŝercas, ne ridas.

Nur unu fojon oni vidis, kiel li ekridetis unuan vesperon, kiam la virino donis al li vespermanĝi.

VI.

Tago post tago, semajno post semajno, pasis jam unu jaro. Mikaelo vivas, kiel antaŭe, ĉe Simeono, laboras. Kaj disvastiĝis pri Simeona laboristo la famo, ke neniu kudras botojn tiel bone kaj tiel solide, kiel Simeona laboristo, Mikaelo. Kaj oni komencis alveturadi al Simeono el ĉirkaŭaĵo por botoj, kaj enspezoj komencis ĉe Simeono pligrandiĝi.

Unu fojon, vintre, Simeono kun Mikaelo sidas, laboras; triĉevala glitkaleŝo kun sonoriletoj alveturas al la domo. Ili ekrigardis tra la fenestro, — la glitkaleŝo haltis apud la domo, veturigisto salte malsupreniĝis, malfermis pordeton. Nobela sinjoro en pelto eliĝas el la kaleŝo. Li eliĝis el la kaleŝo, ekiris al la Simeona domo, eniris sur la peronon. Matrjono elkuris, malfermis la pordon. La sinjoro kliniĝis, eniris dometon, rektiĝis, preskaŭ tuŝis plafonon per la kapo, okupis tutan angulon.

Simeono sin levis, salutis kaj miras sinjoron. Li eĉ ne vidis tiajn homojn. Simeono estas malgrasa, Mikaelo estas ankaŭ malgrasa, kaj Matrjono estas tute malgrasega; sed ĉi tiu estas kvazaŭ homo de alia mondo: vizaĝego—ruĝa, dika; kolo kvazaŭ ĉe bovo; tuta kvazaŭ li estas fandita el fero.

La sinjoro demetis pelton, sidiĝis sur la benkon kaj diras:

— Kiu estas mastro, botisto?

Simeono elpaŝis antaŭen, diras:

— Mi, via moŝto.

La sinjoro ekkriis al sia servisto:

— He, Teodoro, donu ĉi tien materialon.

La servisto enkuris, enportis paketon. La sinjoro prenis la paketon, metis sur la tablon.

— Malligu,—li diras.

La servisto malliĝis. La sinjoro puŝis per la fingro la botan materialon kaj diras al Simeono:

— Nu, aŭskultu vi, botisto. Ĉu vi vidas la materialon?

Simeono palpis la materialon, diras:

— La materialo estas bona.

— Jen, bona! Vi, malsaĝulo, ankoraŭ ne vidis tian materialon. La materialo estas germana, kostas dudek rublojn.

Simeono ektimis, diras:

— Nu kie ni povis vidi.

— Nu jen. Ĉu vi povas fari botojn je mia piedo el tiu ĉi materialo?

— Mi povas, via mosto.

La sinjoro ekkriis je li.

— Vi komprenu, por kiu vi kudras, kaj el kia materialo. Vi kudru al mi tiajn botojn, ke ili estu uzataj tutan jaron, ne kurbiĝu, ne malkudriĝu. Se vi povas, prenu laboron, tranĉu la materialon; se vi ne povas, ne prenu laboron, ne tranĉu la materialon. Mi diras al vi antaŭen — se botoj malkudriĝos, kurbiĝos pli antaŭe ol post unu jaro, mi sidigos vin malliberejon; se ili ne kurbiĝos, ne malkudriĝos dum tuta jaro, mi pagos por laboro dek rublojn.

Simeono ektimis kaj ne scias, kion diri. Li ekrigardis Mikaelon, puŝis lin per la kubuto kaj murmuretas:

— Ĉu preni laboron?

Mikaelo ekklinis la kapon: prenu laboron.

Simeono obeis Mikaelon, prenis sur sin kudri tiajn botojn, ke ili tutan jaron ne kurbiĝu kaj ne malkudriĝu.

La sinjoro vokis la serviston, ordonis demeti boton de la maldekstra piedo, etendis la piedon. „Prenu mezuron de la piedo!“

Simeono kudris paperan rubandon je duonmetro, glatigis ĝin; li genufleksis, viŝis bone la manon per antaŭtuko, por ke ne malpurigi sinjoran ŝtrumpon, kaj komencis mezuri. Simeono elmezuris plandon, elmezuris plandaltecon, komencis mezuri tibikarnon, — la rubando ne sufiĉas. La piedego je tibikarno estas dika, kvazaŭ trabo. „Rigardu, ne mallarĝigu tibiingon“. Simeono komencis plilongigi la paperan rubandon. La sinjoro sidas, movetas piedfingrojn en ŝtrumpon, pririgardas homojn en la ĉambro. Li ekvidis Mikaelon.

— Kiu li estas ĉe vi?

— Ĝi estas mia laboristo; li ja kudros botojn.

— Nu, jen,—diras la sinjoro al Mikaelo, — memoru, tiel kudru, ke ili estu uzataj tutan jaron. Simeono ankaŭ ekrigardis Mikaelon: li vidas — Mikaelo ne rigardas la sinjoron, sed fiksas rigardon en angulon post la sinjoro, kvazaŭ li enrigardas iun; Mikaelo rigardis, rigardis kaj subite ekridetis kaj tuta sereniĝis.

— Pro kio vi, malsaĝulo, ridas? Pli bone estus, se vi zorgu, ke botoj estu pretaj al limtempo.

Kaj Mikaelo diras:

— Ili estos pretaj tute ĝuste, kiam necesos.

— Nu jen.

La sinjoro surmetis la boton, pelton, kuntiris ĝin kaj ekiris al la pordo. Kaj li forgesis sin klini, ekbatigis je pordoplafono per la kapo.

La sinjoro ekinsultis, frotis la kapon, sidiĝis en kaleson kaj forveturis.

Simeono jen diras:

— He, kia li estas saĝega; li disbatis pordoplafonon per la kapo, kaj eĉ nenio okazis al li.

Kaj Matrjono diras:

— Pro tia vivado ili povas esti tiel grasegaj! Tian sanulon eĉ morto ne prenos.

VII.

Kaj diras Simeono al Mikaelo:

— Ni prenis laboron, sed ni riskas altiri al ni mal-feliĉon. La materialo estas kara, kaj la sinjoro estas kolera. Se ni eraros... Nu vi, via okuloj estas pli akrosentaj, kaj lerteco en viaj manoj estas pli granda, ol en miaj; prenu mezuran rubandon. Altranĉu la materialon, mi finos mian laboron.

Mikaelo obeis, prenis la sinjoran materialon; li sternis ĝin sur la tablo, faldis duoble, prenis tranĉilon kaj komencis altranĉi...

Matrjono aliris; ŝi rigardas, kiel Mikaelo altranĉas, kaj miras, kion Mikaelo faras. Matrjono jam al kutimiĝis al botista afero, rigardas kaj vidas, ke Mikaelo altranĉas la materialon ne laŭbotiste, sed tranĉas ronde.

Matrjono volis diri, sed pensas en ŝi mem: „Eble, mi ne komprenis, kiel necesas kudri botojn al la sinjoro, eble, Mikaelo scias pli bone—mi ne enmiksiĝos“.

Mikaelo altranĉis paron da botoj kaj komencis kunkudri ne kutime, sed kiel oni kudras senplandajn botojn.

Matrjono miris ankaŭ tion, sed ne enmiksiĝis. Kaj

Mikaelo ĉiam kudras. Ili komencis tagmanĝi: Simeono sin levis, rigardas—Mikaelo estas kudrinta el la sinjora materialo senplandajn botojn.

Ekĝemis Simeono. „Kiamaniere, li pensas, Mikaelo vivis tutan jaron ĉe mi, eraris neniam kaj nun faris tian malfeliĉaĵon. La sinjoro mendis botojn kun falditaj tibiingoĵ, kaj li kudris senplandajn botojn, difektis la materialon. Kion mi faros? Ja mi ne trovos tian materialon“.

Kaj li diras al Mikaelo:

— He, saĝa kapo,—li diras,—kion vi faris. Mortigis vi min. Ja la sinjoro mendis botojn, kaj kion vi kudris?

Apenaŭ li komencis riproĉi Mikaelon, oni frapas je la pordo. Li elrigardis tra la fenestro: iu alrajdis, alligas ĉevalon. Li malfermis; eniras la sama servisto de la sinjoro.

— Bonan tagon!

— Bonan tagon, kion vi deziras?

— Jen la sinjorino alsendis pri la botoj.

— Kion pri la botoj?

— Nu, pri la botoj,—la botoj malnecesas al la sinjoro. Li mortis.

— Nu?

— Li ne ĝisveturis de vi hejmen, mortis en la kaleŝo. La kaleŝo alveturis al la domo, oni eliris por helpi al li malsupreniĝi, kaj li, kiel granda plenigita sako, flankeniĝis kaj rigidiĝis, kuŝas malviva; oni eligis lin el la kaleŝo kun malfacileco. La sinjorino alsendis, ŝi diras: „diru vi al la botisto, ke la sinjoro estis ĉe vi, mendis

botojn kaj restigis la materialon; nu vi diru tiel: botoj malnecesas, sed ke oni kudru plej baldaŭ el la materialo senplandajn botojn por mortinto; kaj atendu, dum ili kudros, kaj alveturigu kun vi tiujn ĉi botojn“. Jen mi alveturis.

Mikaelo prenis de la tablo detranĉaĵojn, kunvolvis tube, prenis jam pretajn senplandajn botojn, viŝis ilin per antautuko kaj donis al la servisto. La servisto prenis botojn.

— Adiaŭ, mastroj! bonan tagon!

VIII.

Pasis unu jaro, du jaroj; Mikaelo vivas ĉe Simeono jam sesan jaron. Li vivas kiel antaŭe. Li iradas nenien, parolas nenion superfluan kaj dum tuta tempo ekridetis nur dufoje: unu fojon, kiam la virino donis al li vespermanĝon, duan fojon—je la sinjoro. Simeono estas kontentega je sia laboristo. Kaj li ne demandas lin plu, de kie li estas; nur solan li timas, ke Mikaelo foriros de li.

Ili sidas unu fojon hejme. La mastrino metas potojn en fornon, la infanoj kuradas sur benkoj, rigardadas tre fanestroj. Simeono kudras apud unu fenestro, Mikaelo alnajlas kalkanumon apud la alia.

La knabo alkuris laŭ la benko al Mikaelo, sin apogis je lia ŝultro kaj rigardas tra fenestro.

— Onklo Mikaelo, rigardu: komercistino kun knabinetoj iras ŝajne al ni. Kaj unu knabineto estas lama.

Ĵus kiam la knabo diris ĉi tion, Mikaelo ĉesis labori, sin turnis al la fenestro, rigardas straton.

Kaj Simeono miris. Antaŭe Mikaelo neniam rigardis straton, kaj nun li tute proksimiĝis al la fenestro, rigardas ion. Simeono ankaŭ ekrigardis tra la fenestro: li vidas—vere iras al lia domo virino, pure vestita, kaj kondukas je manoj du knabinetojn en peltetoj, en ŝaletoj. La knabinoj estas tute similaj unu al alia. Nur ĉe unu knabineto la piedeto estas iom difektita,—ŝi iras, lametas.

La virino eniris sur la peronon, en la vestiblon, ekpalpis la pordon, altiris ĝin je riglilo kaj malfermis. Ŝi pasigis antaŭ sin du infanetojn kaj mem eniris la ĉambron.

— Bonan tagon, mastroj!

— Bonan tagon! Kion vi deziras?

La virino sidiĝis apud la tablo. La knabinetoj sin alpremis al ŝiaj genuoj: ili timas la homojn.

— Jen necesas kudri ĝis printempo por la knabinetoj ledajn ŝuojn.

— Estas eble. Antaŭe ni ne kudris tiajn malgrandetajn, sed tamen estas eble. Jen Mikaelo estas ĉe mi lerta botisto.

Simeono ekrigardis Mikaelon kaj vidas: Mikaelo ĉesis labori, sidas, ne deturnas de la knabinetoj la okulojn.

Kaj Simeono miris je Mikaelo. Vere, la knabinetoj estas bonaj: nigrokulaj, grasetaj, vangruĝaj; kaj peltetoj kaj ŝaletoj estas bonaj ĉe ili, tamen Simeono ne komprenas, pro kio li tiel enrigardas ilin, kvazaŭ ili estas konataj de li.

Simeono miris kaj komencis paroli kuŝ la virino, fari kondiĉon pri la prezo. Ili interkonsentis; Simeono faris paperan rubandon por mezurado. La virino suprenigis sur siajn genuojn la lametan knabinecon kaj diras:

— Jen prenu du mezurojn de tiu ĉi knabineco: mezuron de la difektita piedeto—por unu ŝueto, kaj mezuron de la rekta piedeto—por tri ŝuetoj. Ili havas piedetojn tute similajn. Ili estas dunaskitaj.

Simeono prenis mezuron kaj diras pri la lametolino:

— De kio ĝi okazis al ŝi? Ŝi estas tiel bona knabineco. Ĉu ĝi estas de naskiĝo?

— Ne, la patrino alprenis la piedeton.

Matrjono ekparolis, — ŝi volas ekscii, kiu estas la virino kaj kies estas la infanoj, kaj ŝi diras:

— Ĉu vi ne estas ilia patrino?

— Ne, mastrino, mi ne estas ilia patrino; ili estas fremdaj al mi, adoptitaj.

— Ili estas ne viaj infanoj, kaj kiel vi kompatas ilin!

— He, kiel ne kompati ilin,—mi nutris ilin per miaj mamoj. Mi havis mian infanon, sed Dio prenis ĝin; mi ĝin ne tiel kompatis, kiel mi kompatas ilin.

— Sed kies ili estas?

IX.

La virino komencis rakonti:

— Antaŭ ses jaroj, ŝi rakontas, ĝi okazis; dum unu semajno la orfinoj perdis la gepatrojn: marde oni enterigis ilian patron, kaj vendrede la patrino mortis. Tiun tempon mi vivis kun mia edzo en la sama vilaĝo, Ili

estis niaj najbaroj, korto apud korto. Ilia patro estis vilaĝano senparenca, laboradis en arbaro. Kaj unu fojon oni faligis arbon sur lin, kaj ĝi alpremegis lin. Apenaŭ oni ĝisveturigis lin al la domo, kaj li mortis; la virino la saman semajnon naskis du infanojn, jen ĉi tiujn knabinetojn. Malriĉeco, senparenceco; ŝi vivis sola, sen maljunulino, sen ia knabino.

Sola ŝi naskis, sola ŝi mortis.

Mi ekiris matene viziti la najbarinon: eniras mi en la ĉambron, kaj ŝi, karulino, jam rigidiĝis. Kaj kiam ŝi estis mortanta, ŝi falis sur la knabineton. Jen ĉi tiun ŝi alpremis, elartikigis la piedeton. Homoj venis, lavis, ordigis, faris ĉerkon, enterigis. Ĉiam—bonaj homoj. La knabinetoj restis solaj. Kion fari al ili? Kaj el samvilaĝaninoj mi sola havis suĉinfanon. Ĝi estis unua infano, knabo; mi mamnutris lin jam okan semajnon. Mi prenis ilin al mi por ia tempo. Vilaĝanoj kunvenis; ili meditis, meditis, kion fari al ili, kaj diras al mi: „vi, Mario, restigu la knabinetojn ĝis ia tempo ĉe vi, kaj ni tiamtempe prikonsideros“. Mi mamnutris unu fojon la knabineton kun rektaj piedetoj, kaj tiun ĉi, lametulinon, mi ne intencis mamnutri. Mi ne esperis, ke ŝi vivos. Sed mi pensas en mi mem, pro kio suferos la anĝela animeto; kaj mi ekkompatis ŝin. Mi komencis mamnutri. Kaj tiamaniere mi mamnutris tri infanojn: unu propran mian kaj du ĉi tiujn. Mi estis juna, forta, kaj nutraĵo estis bona. Kaj mi havis tiom da lakto en la mamoj, ke, okazadis, ilia buŝo tropleniĝis per lakto kaj ili tusegis pro malĝusta engluto. Mi mamnutras du, kaj tria

atendas. Unu finis mamsuĉi, mi prenas trian. Kaj tia maniere Dio donis, ke mi elnutris ĉi tiujn kaj enterigis mian en unujara aĝo. Kaj Dio ne donis plu al mi infanojn. Kaj malmanko komencis pligrandiĝi. Nun jen n vivas tie ĉi en muelilo, ĉe komercisto. Salajro estas granda, vivo estas bona. Kaj infanoj ne naskiĝas. Kaj kiel mi vivus sola, se mi ne havus ĉi tiujn knabinojn! Do kiel mi ne amos ilin? Ili nur solaj estas ĉe mi.

La virino per unu mano alpremis al si la lametulinon, kaj per alia uano komencis visi larmojn de siaj vangoj.

„Videble, proverbo diras nevane: eble estas vivi sen patro, sen patrino, kaj neeble estas vivi sen Dio“.

Ili interparolis tiel; la virino sin levis por ekiri; la gemastroj akompanis ŝin, ekrigardis Mikaelon, Li sidas, kunmetinte la manojn sur la genuoj, rigardas supren, ridetas.

X.

Simeono aliris al li. „Nu jen, Mikaelo!“ li diras. Mikaelo sin levis de la benko, metis laboraĵon, demetis la antaŭtukon, ekklinis sin antaŭ gemastroj kaj diras:

— Pardonu, gemastroj! Dio pardonis min. Pardonu vi ankaŭ.

Kaj la gemastroj vidas, ke lumo iras de Mikaelo. Kaj Simeono sin levis, ekklinis sin antaŭ Mikaelo kaj diris al li:

— Mi vidas, Mikaelo, ke vi estas ne simpla homo; kaj mi ne povas vin deteni, ne povas demandi vin. Diru

nur al mi, pro kio vi estis malserena, kiam mi trovis vin kaj alkondukis hejmen; kaj kiam la virino donis vespermanĝi, vi ekridetis al ŝi kaj de tiu tempo vi fariĝis pli serena. Poste, kiam la sinjoro mendis botojn, vi ekridetis duan fojon, kaj de tiu tempo vi fariĝis ankoraŭ pli serena; kaj nun, kiam la virino alkondukis la knabinetojn, vi ekridetis trian fojon kaj tute sereniĝis. Diru al mi, Mikaelo, pro kio estas tia lumo de vi kaj pro kio vi ekridetis trifoje?

Kaj Mikaelo diris:

— Pro tio lumo iras de mi, ke mi estis punita, kaj nun Dio pardonis min. Kaj mi ekridetis trifoje pro tio, ke mi devis sciigi tri Diajn vortojn. Kaj mi sciigis la Diajn vortojn: unu vorton mi sciigis, kiam via edzino ekkompatis min, kaj pro tio mi ekridetis unuan fojon. Duan vorton mi sciigis, kiam la riĉulo mendis botojn, kaj mi ekridetis duan fojon; kaj nun, kiam mi ekvidis la knabinetojn, mi sciigis lastan trian vorton, kaj mi ekridetis trian fojon.

Kaj Simeono diris:

— Diru al mi, Mikaelo, pro kio Dio punis vin, kaj kiaj estas la vortoj de Dio, por ke mi ankaŭ sciu ilin.

Kaj diris Mikaelo:

— Dio punis min pro tio, ke mi malobeis lin. Mi estis anĝelo sur ĉielo kaj mi malobeis Dion. Mi estis anĝelo sur ĉielo, kaj Dio sendis min, por elmeti animon el virino. Mi alflugis teren, vidas: unu virino kusas malsana; ŝi naskis du infanojn, du knabinetojn. La knabinetoj movetiĝas apud la patrino, kaj la patrino ne po-

vas preni ilin al la mamoj. La virino ekvidis min, komprenis, ke Dio alsendis min por ŝia animo, ekploris kaj diras: „Dia anĝelo! ĵus oni enterigis mian edzon,—li estis mortigita per arbo en arbaro. Mi havas nek fratinojn, nek onklinojn, nek avinojn; neniu estas, kiu elkreskigus miajn orfinojn; ne prenu vi mian animon, allasu, ke mi mem nutru la infanojn, elkreskigu ilin. Infanoj ne povas vivi sen patro, sen patrino“. Kaj mi obeis la patrinojn; mi almetis unu knabinojn al la mamoj, donis alian al la patrino en manojn kaj supreniĝis al Sinjoro sur ĉielon. Mi alflugis al Sinjoro kaj diras: mi ne povis elmeti animon el la naskintino. La patro estas mortigita per arbo, la patrino naskis du infanojn kaj petegas ne preni ŝian animon, diras: „allasu, ke mi mem nutru la infanojn, elkreskigu ilin. Infanoj ne povas vivi sen patro, sen patrino“. Kaj mi ne elmetis la animon el la naskintino. Kaj Sinjoro diris: „Iru, elmetu la animon el la naskintino, kaj vi sciigos tri vortojn: kio estas en homoj, kio ne estas donita al homoj kaj per kio homoj estas vivaj. Kiam vi sciigos, vi revenos sur ĉielon“. Mi ekflugis reen sur la teron kaj elmetis animon el la naskintino.

Defalis la infanoj de la mamoj. La malviva korpo falis sur la lito, alpremis unu knabinojn, elartikigis al ŝi la piedeton. Mi supreniĝis super la vilaĝo, volis ekporti la animon al Dio, sed vento ekkaptis min, miaj flugiloj malleviĝis, defalis, kaj la animo ekiris sola al Dio, kaj mi falis teren apud vojo.

XI.

Kaj komprenis Simeono kun Matrjono, kiun ili vestis kaj nutris kaj kiu vivis inter ili; kaj ili ekploris pro timo kaj pro ĝojo. Kaj la anĝelo diris:

— Mi restis sola en kampo kaj nuda. Antaŭe mi ne sciis homan mizeron, sciis nek malvarmon, nek malsaton, kaj fariĝis homo. Mi malsatiĝis, frostiĝis kaj ne sciis, kion fari. Mi ekvidis,—kapelo estas farita en kampo por Dio, mi aliris al la Dia kapelo; mi volis rifuĝi en ĝi. La kapelo estis fermita per seruro, kaj estis neeble eniri. Kaj mi sidiĝis post la kapelo, por kaŝi min kontraŭ vento. Vesperiĝis; mi malsatiĝis kaj frostiĝis, kaj ĉio doloris en mi. Subite mi aŭdas: homo iras voje, portas botojn, interparolas kun si mem. Kaj mi ekvidis unuan fojon morteman homan vizaĝon post tio, kiam mi fariĝis homo, kaj tiu ĉi vizaĝo ŝajnis terura al mi,—mi deturnis min de ĝi. Kaj mi aŭdas, ke tiu ĉi homo interparolas kun si mem pri tio, kiel li kovros sian korpon vintre kontraŭ frostoj, kiel li nutros edzinon kaj infanojn. Kaj mi pensis: mi pereas pro malvarmo kaj malsato, kaj jen homo iras, pensas nur pri tio, kiel li kovros sin kaj la edzinon per peltito kaj nutros per pano. Li ne povas helpi al mi. La homo ekvidis min, sulkis la vizaĝon, fariĝis ankoraŭ pli terura kaj preterpasis. Kaj mi malesperis. Subite mi aŭdas, la homo reiras. Mi ekrigardis kaj ne ekkonis antaŭan homon: tiam morto estis en lia vizaĝo, nun ĝi subite fariĝis viva, mi ekkonis Dion en lia vizaĝo. Li aliris al mi, vestis min,

prenis kun si kaj ekkondukis al si hejmen. Mi venis lian hejmon, virino eliris renkonte al ni kaj komencis paroli. La virino estis ankoraŭ pli terura, ol la homo: morta spirado iris el ŝia buŝo, kaj mi ne povis eĉ spiri pro mortiga malbonodoro. Ŝi volis elpeli min en malvarmon kaj mi sciis, ke ŝi mortos, se ŝi elpelos min. Kaj subite la edzo rememorigis al ŝi pri Dio. Kaj la virino subite ŝanĝiĝis. Kaj kiam ŝi donis al mi vespermanĝon kaj mem rigardis min, mi ekrigardis ŝin—en ŝi jam ne estis morto, ŝi estis viva, kaj mi ekkonis Dion en ŝi.

Kaj mi rememoris unuan vorton de Dio: „vi sciiĝos, kio estas en homoj“. Kaj mi sciiĝis, ke amo estas en homoj. Kaj mi ekĝojis pro tio, ke Dio jam komencis malkovri al mi tion, kion li promesis, kaj mi ekridetis unuan fojon. Sed mi ne povis ankoraŭ sciiĝi ĉion. Mi ne povis kompreni: kio ne estas donita al homoj, kaj per kio homoj estas vivaj.

Mi komencis vivi ĉe vi kaj travivis unu jaron; kaj unu homo alveturis por mendi botojn,—tiajn, ke ili estu uzataj tutan jaron, ne malkudriĝu, ne kurbiĝu. Mi ekrigardis lin kaj subite ekvidis post liaj ŝultroj mian kamaradon—anĝelon de morto. Neniu, krom mi, vidis tiun ĉi anĝelon, sed mi konis lin kaj sciis, ke la suno ankoraŭ ne subiros, kiam la animo de la riĉulo estos prenita. Kaj mi pensis: „la homo provizas al si por tuta jaro, sed ne scias, ke jam vespere li ne estos viva“. Kaj mi rememoris duan vorton de Dio: „vi sciiĝos, kio ne estas donita al homoj“.

Kio estas en homoj, mi jam sciis. Nunmi sciiĝis, kio ne estas donita al homoj. Ne estas donite al homoj scii, kion ili bezonas por sia korpo. Kaj mi ekridetis duan fojon. Mi ekĝojis tion, ke mi ekvidis kamaraĉon anĝelon, kaj tion, ke Dio malkovris al mi duan vorton.

Sed mi ne povis kompreni ĉion. Mi ne povis ankoraŭ kompreni, per kio homoj estas vivaj. Kaj mi ĉiam vivis kaj ĉiam atendis, kiam Dio malkovros al mi lastan vorton. Kaj sesan jaron knabinoj dunaskitaj venis kun virino; mi ekkonis la knabinojn kaj sciiĝis, kiamaniere la knabinoj restis vivaj. Mi sciiĝis kaj ekpensis: „la patrino petis por infanoj, kaj mi kredis la patrinon, pensis, ke infanoj ne povas vivi sen patro, sen patrino; sed fremda virino nutris, kreskigis ilin“. Kaj kiam la virino kortusiĝis pri la fremdaj infanoj kaj ekploris, mi ekvidis en ŝi vivan Dion kaj komprenis, per kio homoj estas vivaj. Mi sciiĝis, ke Dio malkovris al mi lastan vorton kaj pardonis min. Kaj mi ekridetis trian fojon.

XII.

Kaj la korpo de la anĝelo nudiĝis, kaj li vestiĝis tuta per lumo, tiel ke okuloj ne povis rigardi lin, kaj li ekparolis pli laŭte, kvazaŭ la voĉo iris ne el li, sed de ĉielo. Kaj la anĝelo diris:

— Mi sciiĝis, ke ĉiu homo estas viva ne per zorgo pri si, sed per amo.

Ne estis donite al la patrino scii, kio necesas al ŝia

infanoj por vivo. Ne estis donite al la rículo scii, kio necesas al li mem. Kaj estas donite al neniu scii: ĉu botoj necesas al li, viva, ĉu senplandaĵoj necesos al li, malviva, vespere.

Mi restis viva, kiam mi estis homo, ne per tio, ke mi pensis pri mi mem, sed per tio, ke estis amo en pasanto kaj en lia edzino, kaj ili ekkompatis kaj ekamis min. La orfinoj restis vivaj ne per tio, ke oni pensis pri ili, sed per tio, ke estis amo en koro de fremda virino, kaj ŝi ekkompatis, ekamis ilin. Kaj ĉiuj homoj estas vivaj ne per tio, ke ili pensas pri si mem, sed per tio, ke estas amo en homoj.

Mi sciis antaŭe, ke Dio donis vivon al homoj kaj volas, ke ili vivu; nun mi komprenis ankoraŭ ion alian.

Mi komprenis, ke Dio ne volis, ke homoj vivu dise, kaj pro tio li ne malkovris al ili tion, kion ĉia homo bezonas por si; kaj Dio volis, ke ili vivu kune, kaj pro tio li malkovris al ili tion, kion ili ĉiuj bezonas por si kaj por ĉiuj.

Mi nun komprenis, ke al homoj nur saĝnas, ke ili estas vivaj per zorgo pri si, sed ke ili estas vivaj per sola amo. Kiu estas en amo, tiu estas en Dio, kaj Dio estas en li, ĉar Dio estas amo.

Kaj anĝelo ekkantis laŭdon al Dio, kaj de lia voĉo la domo ekskuiĝis, la plafono dismoviĝis kaj la fajra kolono stariĝis de tero ĝis ĉielo. Kaj Simeono kun la edzino kaj kun la infanoj falis teren. Kaj la flugiloj di-

setendiĝis ĉe la anĝelo post la dorso, kaj li supreniĝis ĉielon.

Kaj kiam Simeono rekonsciĝis, la domo staris kiel antaŭe, kaj en la domo neniu jam estis, krom hejmuloj.



851



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

112-121 I